# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)
P.K. 39004, TEL AVIVO
N-ro 64 - APRILO 1978

---

## האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל
ת.ד. 39004, תל-אביב
העורך: אלכסנדר מנור
חוברת 64 - אפריל 1978

## ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| ELI – jarkonferenco 1978 | A. Manor | 1. |
| Kiel antaŭenigi E-on | R. Alberg | 2. |
| Honto al infanmurdistoj | A.M. | 4. |
| Kontraŭ la hipokrituloj | J. Kohen Cedek | 6. |
| Israel Israeli | N. Drezner | 8. |
| Ĵak Isakov | A. | 9. |
| La elektopovo | J. Giladi | 9. |
| La II-a Templo | J. Ŝemer | 10. |
| Kredo | H. Mortinson (trad. E. Schuldenfrei) | 11. |
| Okulvitroj-misteraj helpiloj | E. Kiŝon (trad. G. Ziegler) | 12. |
| Aforismoj | | 13. |
| Mia kolombino | Ŝ. Mandelkern (trad. J. Kohen Cedek) | 14. |
| La suna enrgio | R. Berlinerblaŭ | 15. |
| Ĝemeliĝo de Gotenburgo kaj Tel Avivo | | 16. |
| Krucvortenigmo | A. Holzhaus | 17. |
| Nia movado kaj agado | | |
| La kluba agado | E. Haroun | 18. |
| Klubaj vesperoj | | 18. |
| Novaj samideanoj | | 19. |
| Diversaĵoj | | 19. |


# ISRAELA ESPERANTISTO


ORGANO de ESPERANTO – LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel Avivo

N-ro 64 – Aprilo 1978

Ĉefredaktoro: Aleksander Manor

redaktoro: Josef Ŝemer


## E.L.I.-JARKONFERENCO 1978

Nia jarkonferenco, kiu okazos la 25-an de aprilo 1978, jam staras ĉe la sojlo de la solenaĵoj de tridekjara ekzistado de Israelo kiel renovigita juda ŝtato. Al tiu historia okazintaĵo ni planas dediĉi la venontan numeron de "Israela Esperantisto".

Okaze de tiu solena kaj epokfara evento ni desegnas en ĉefaj trajtoj iom de la evoluo de la Esperanto-Movado en Israellando ĝis la fondiĝo de la ŝtato en 1948.

La unuan esperantistan societon en Israellando fondis en Jerusalemo en 1907 d-ro E. Smic, la direktoro de la tiea germana hospitalo. La fama juda kuracisto kaj lingvisto d-ro Aĥaron Meir Mazje, direktoro de la juda hospitalo "Bikur Ĥolim", aliĝis al tiu ĉi unua esperanta rondo kaj ambaŭ ili estis la unuaj kiuj komencis en Israellando la poresperantan propagandon.

Post la unua mondmilito fondiĝis en Jerusalemo (1924) Esperanta Societo, kiun prezidis Natan Ben-Cion Ĥavkin. (vidu la broŝureton eldonitan de E.L.I. en 1976: J. Kohen Cedek, "N.B. Ĥavkin: Ekzemplo de homa vivo"). Ano de tiu ĉi societo estis Itamar Ben-Avi (1884-1943), filo de Eliezer Ben-Jehuda (1858-1922), la reviviginto de la hebrelingva parolado en Israellando. Itamar Ben Avi redaktis la ĉiutagan ĵurnalon "Doar Hajom" en Jerusalemo. Li dediĉis en ĝi al Esperanto unu grandformatan gazetpaĝon.

La unua landkunveno de Israellandaj esperantistoj en Jerusalemo en 1925;ĉeestis 45 kunvenintoj. En 1927 aperis la unua Esperanto-Hebrea vortaro kun gramatiko de Ezra Melamed (de j. 1955 profesoro en la universitato de Jerusalemo kaj aŭtoro de diversaj hebreaj libroj pri Talmudo, hebrea gramatiko ktp.)

En januaro 1934 okazis en Jerusalemo la dua tutlanda kunveno. En la sama jaro oni solene inaŭguris en Tel Avivo la straton Zamenhof.

La tria landkunveno okazis en aprilo 1941 en Ĥajfa. Ĝi fondis la "Palestinan Esperanto-Ligon" (P. E. L.)

La kvara tutlanda P.E.L.-kunveno okazis dum la Paska semajno 1942 en Tel Aviv. Partoprenis ĝin pli ol 100 samideanoj. Prezidis la fama hebrea verkisto d-ro Imanuel Olsvanger.


La kvina konferencookazis en Jerusalemo la 21-23 de aprilo 1943. Partoprenis pli ol 120 samideanoj.

La sesa tutlanda P.E.L.-kunveno okazis la 10-14 de aprilo 1944 en Jerusalemo kun pli ol 100 partoprenintoj. "Keren Hajsod" prezentis al la kunveno bele ilustritan kajeron "Savo kaj Hejmreveno" verkitan de d-ro I. Olsvanger.

La sepa jarkunveno(1945)kaj la oka(1946)okazis en Jerusalemo.

Post la fondiĝo de la ŝtato okazis tutlanda kunveno en aŭtuno 1949,"la unua en Israelo".P.E.L. alinomiĝis je Esperanto-Ligo en Israelo (E.L.I).

A. Manor



## KIEL ANTAŬENIGI ESPERANTON

Ĉu Esperanto estas praktika afero - por ŝpari la monon dum eksterlandaj vojaĝoj, aŭ idealisma - ilo por plimultigi la amikecon kaj plifortigi la pacon en la mondo?

Laste ni dediĉis kelkajn klubajn vesperojn al diskuto kiel disvastigi la Esp. movadon; tiam leviĝis tiuj demandoj. La fakto estas, ke ĉiam, kiam oni alproksimiĝas al diskuto pri la plukresko de nia movado, leviĝas tiuj demandoj. Kelkaj samideanoj substrekis idealismajn aspektojn de Esp. Aliaj pensas, ke oni ne bezonas paroli pri altegaj idealoj, ĉar en la okuloj de aŭskultantoj, ili aspektas kiel homoj,kiuj volas per unu sola kaj simpla rimedo savi tutan homaron. Simile ili agas, kiel homoj,kiuj trovinte la sanigan valoron de karotoj senĉese predikas inter amikoj kaj konatoj pri la mirinda valoro de karotsuko, kiu povas fari la homaron pli feliĉa kaj bela kaj pro kies influo eĉ la beboj ne ploros.



Inteligenta samideano scias, ke inter la homoj troviĝas multspecaj problemoj: sociaj, ekonomiaj, moralaj aŭ psikologiaj. Sed aliflanke,li scias, la sentoj de fremdeco kaj strangeco, de supereco kaj malsupereco ekzistas inter fremdlingvanoj. Ebleco kontribui,ke diversaj nacianoj interkonatiĝu senpere kaj sur egala bazo,povas kontribui ion aŭ multon por kompreni la problemojn de Esp.

Oni ne devas timi aŭ honti pri la vorto idealismo. Zamenhof ne nur kreis la lingvon; li ankaŭ prezentis Internan ideon. Unu de la partoprenantoj en la diskuto en la klubo diris: "Hodiaŭ la modo pri idealismo? Tiu modo en Israelo forpasis jam antaŭ 40 jaroj. Oni devas instigi la homojn per materialismaj motivoj." Mi tre dubas pri tio.

Ni ĉiuj estas kombinaĵo de idealismo kaj praktikeco. Estas interese, ke tipj en nia movado, kiuj parolas plej ofte pri praktikeco kaj materiaj aspektoj de Esp., estas mem la plej idealismaj. Estas ili, kiuj sin mem dediĉas kaj oferas sian tempon kaj energion en la laboro por Esp. Kompreneble, en nia propagando ni ne devas troigi, ni ne atendu, ke Mesio venos tuj post kiam la lernanto finos la dek ses lecionojn de la komenca kurso. Cetere la demando estas, kio precize estas materialismo kaj kio estas idealismo. Se oni lernas Esp. por povi vojaĝi eksterlanden pli facile kaj pli malmultekoste, ĉu oni faras tion nur por ŝpari monon aŭ tempon, aŭ ĉu oni ne faras tion ankaŭ por povi paroli kaj koni senpere diversajn personojn de aliaj landoj;kaj tiu lasta ne estas idealisma afero?

Ni ne estas potenca movado. Sed la ideo pri neŭtrala facila helplingvo ne forlasos la menson de homoj. Nia tasko estas nutri kaj kuraĝigi tiun ideon. Eble ni devos atendi longan tempon, sed ni devas esti pretaj montri al la mondo, ke tiu ideo povas ekzisti kiel egektiva fakto. En multaj lingvoj estas la vorto "konjunkturo". Kojunturo signifas la kunekziston de diversaj cirkonstancoj, kiuj favoras sukceson de iu entrepreno. La kondiĉoj hodiaŭ ne estas favoraj por esperanto. Ni ĉiuj konas la situacion. Sed la vivo ŝanĝiĝas. Ni kredas sincere, ke post certa tempo la sociaj kaj politikaj faktoj ŝanĝiĝos kaj la mondo estos preta por Esp. Ni devas esti pretaj, kiam alvenos tiu tempo. Ni havas bonan ekzemplon en la Cionismo. En la komenco de nia jarcento la Cionismo estis tre malforta movado,subtenata per la groŝoj de malriĉaj judoj. La influaj kaj riĉaj homoj interne de la juda popolo kaj ekster ĝi estis kontraŭ Cionismo kaj priridis ĝin. Post la unua mondmilito venis la konjunkturo por Cionismo kaj ĝi komencis marŝi"sur la ĉefa ŝoseo".

Dum niaj diskutoj estis proponitaj kelkaj tre utilaj kaj praktikaj rimedoj por disvastigi Esperanton. Pri tio mi deziras paroli en venonta numero de I.E.

Reuven Alberg

La membroj de Esperanto - Ligo en Israelo (E.L.I.) funebras ĉagrene kaj indigne pro la viktimoj de kruelaj murdistoj de P.L.O., kiuj murdis maljunulojn, virinojn kaj infanojn kaj esprimas siajn konsolojn al la infanperdintaj familioj.

## HONTO AL INFANMURDISTOJ

"Tiun venĝon, venĝon pro la sango de malgranda infano, eĉ la satano mem ankoraŭ ne kreis".

Ĥ. N. BJALIK

### Roi kaj Ilan de Kibuco Neve-Jam.

En la kibuco Neve-Jam okazis la entombigo de la kibucanino Rivka Hoĥman kaj ŝiaj infanoj: la trijara Ilan kaj sepjara Roi. Soldatoj portis sur siaj ŝultroj la ĉerkojn kaj staris apud la tomboj, kiel honoraj deĵorantoj.

La reprezentanto de la kibuco diris: "Nia spirito ne rompiĝis. Sango kaj fajro nur forĝos nin. Ni batalu ne nur por la fizika ekzisto, sed ankaŭ por la humana vizaĝo de la homo."

La parencoj de Rivka Hoĥman estis liberigitaj de hitleraj mortkoncentrejoj.

### JOAV MIŜKAL (sesjara)

Miloj da civitanoj en Tiberiado partoprenis la funebran ceremonion de la sesjara Joav. Post la ĉerko dum la funebra ceremonio iris nur la vundita patro, ĉar la patrino ankoraŭ ne povis forlasi hospitalon. Joav estis lernanto en la unua lernejklaso. Post kiam la instruistino klarigis al infanoj la malbonsorton, kiu okazis al ilia kolego, ili jam ne plu povis lerni kaj pasigis la tempon pentrante. En la plimulto de la desegnaĵoj estis pafantaj teroristoj en brulanta aŭtobuso.

### Naama (kvinjara)

Kiam la teroristoj de PLO pafis en la aŭtobuso sidis Naama Hadani ĉe la ŝoforo, ĉar ĉiam ŝi volis vidi ĉion kio ŝin ĉirkaŭas. Ŝi estis la unua murdita.

Bukedoj de ŝtatprezidento, de la registaro kaj de la najbaroj, kiuj konis la brilantajn okulojn de la etulino, kovris la freŝan tombon.

### Ĥaviv Enkave kaj liaj du infanoj

Unu apud la alia estis entombigitaj la patro Ĥaviv Enkave kaj liaj du filoj, la dekjara Icĥak kaj la trijara Galit.



### Erez Elfand kun sia patro Icĥak

Unu apud la alia estis entombigitaj la sesjara Erez kun sia patro Icĥak.

### Moti

La patro de la naŭjara Moti estis la ŝoforo de la aŭtobuso, en kiu troviĝis - la edzino, la dekunujara Gadi kaj la kvinjara Ifat. Ili ĉiuj estis murditaj.

### Liat Galon

La sesjara Liat estis entombigita per armea ceremonio. La funebran ceremonion partoprenis nur la vundita patrino kun centoj da samurbanoj. La pli serioze vundita patro ankoraŭ kuŝis en malsanulejo.

### Revital Aharonoviĉ

La dekkvar-jara Revital estis mortigita en la sanga aŭtobuso kun siaj geavoj.

### Omri Tel-Oren

La 14-jara Omri estis konata kiel vegeterano. Li klarigis, ke li elektis la vojon de vegetarismo por ne mortigi la animalojn por manĝo kaj ankaŭ li perdis la vivon samtempe.

### Noemi

La deksepjara estis murdita sidante sur la lastaj seĝoj de aŭtobuso kaj legante libron.

### La vunditaj infanoj

Rut Miŝkal(3-j.); Tal Enkave (8- j.); Gabi Zait (11-j.); Dan Luŝiner (11-j.); Edi Heluani (13-j.);Anat Glutman (14-l.).

La plimulto de murditoj (34) kaj vunditoj(32) estis olduloj, virinoj kaj infanoj.

## LA EĤOJ EN LA MONDO

De ĉefoj de diversaj ŝtatoj, de personecoj en la tuta mondo kaj de samideanoj alvenis al Israelo esprimoj de kondolenco kaj deklaroj mallaŭdantaj la sovaĝan kaj bestan terorismon, kiu klare montris la veran vizaĝon de la terororganizaĵo P. L. O.

Estas grave substreki, ke samtempe en Moskvo havis lokon protesta demonstracio kontraŭ la atako de teroristoj en Israelo, kiuj eliris el siaj bazoj en Libano. La demonstracion gvidis la fama verkisto kaj nobelpremiito Andrej Saĥarov kaj lia edzino. La demonstrantoj portis proklamon kun surskribo: "Honto al infanmurdistoj", "Honto al tiuj, kiuj defendas murdistojn".

La amasa murdo en Israelo per P.L.O-anoj okazis post la interparolo de Jaser Arafat (ĉefo de P.L.O.)kun Breĵniev. Dum tiu renkontiĝo la ĉefo de P.L.O. estis avertita, ke li devas jam trapasi de paroloj al agoj kaj pruvi, ke liaj fortoj povas jam gvidi efike la lukton kontraŭ Israelo. La atako mem okazis precize, kiam Arafat estis en Orienta Germanio kaj traktis pri ĝia helpo al P.L.O. en ĝiaj agoj kontraŭ Israelo. Tio jam ne estas sekreto, ke Sovetunio metis cinike la taskon murdi Judojn sur la ŝultrojn de Orientaj Germanoj.

Neniu dubo povas esti pri tio, ke Jaser Arafat ne aŭdacus kaj ne havus kuraĝon plenumi la kriman teroristan atakon, se li ne estus certa, ke ĝi ne kontraŭas la opinion de Sovetunio. Laŭ la oficiala komuniko de P. L. O. estis organizita atako de Palestinanoj kontraŭ la Israela armeo. Gi estis destinita doni al la gvidantoj de Kremlo oportunan kaŭzon prezenti tiun aĉan operacion, kiel legitiman militan agon en la liberiga batalo. Pri tio atestas la fakto, ke la oficiala Rusa ĵurnalo"Pravda" publikigis tiun ĉi mensogan version por siaj legantoj kaj tute prisilentis la amasmurdadon de civitanoj en la aŭtobuso.

## KONTRAŬ LA HIPOKRITULOJ

Estas notinde, ke post la masakro de 34 civilaj viroj, virinoj kaj infanoj kun 82 vunditaj senkulpaj homoj (kelkaj de ili vivdanĝere) sur la vojo al Tel Aviv, sabate la 11-an de Marto ĉ.j., fare de arabaj teroristoj, - multaj eksterlandaj ŝtatistoj, same kiel tieaj engazetaj ĉefartikoloj, espriminte sinretenan kondamnon pri tiaj fifaroj, tuj ekrekomendis al Israelio NE RESPONDI al la krimuloj per kontraŭaj agoj. Ciuj ili trovis plej diversajn argumentojn, moralajn kaj real-politikajn, eĉ el vidpunkto pragmate utila, ke ne taŭgus al Israelio levi la glavon kontraŭ la palestin-araba movado. Kvankam ties deklarita celo estas ruinigi Israelan ŝtaton kaj ekstermi la judojn.

En la mondo ankoraŭ regas ia neklara, heredita sento kaj subkonscia tezo, ke kvankam ĝenerale dirante, mortigo estas akto krima, precipe kontraŭ virinoj kaj infanoj, tamen mortigo de judoj estas afero iom alia... Verdire, ĉiu atakito nature rajtas sin defendi; sed se li estas judo, tiu ĉi rajto jam ne estas akto memkomprenebla.

Tra la tuta mondhistorio, ne estas trovebla fakto, ke buĉado de judoj estis iam punita. Antijudaj ekscesoj estis ĉiam traktitaj kiel aktoj kontraŭ la bonordo, sed ne kiel krimoj kontraŭ certaj homoj. Des pli la faroj de arabaj teroristoj, eĉ kiam evidentiĝis, ke tiuj "heroo,j" intence di-



rektis siajn militagojn kontraŭ virinoj kaj infanoj. La respektado de ilia organizo ne estis kondamnita kaj ilia pozicio en diplomataj rondoj ne estis aboliciita.

Oni elpensis miton, ke P.L.O., - la palestin-araba "liberiĝ-movado" estas legitima asocio, dum la teroratakojn gvidas nur ties "randaj", ne bridigeblaj elementoj. Aro de politikistoj, gazetaj, radiaj kaj televidaj ĵurnalistoj scias pri kompleta identiĝo inter PLO kaj la teroristoj. Tamen ili flegas la pretekston, ke tiuj kaj la aliaj ne estas identaj kaj ke murdado de turistoj, pilgrimantoj, kaptado de garantiuloj, kapero de aviadiloj, masakro de gelernantoj kaj sportistoj,entute ne estas agoj de la legitima organizo PLO. Sekve de tio la estroj de PLO estas estimindaj anoj de UNO, kiu agnoskas la "legitimajn rajtojn de la palestina popolo". Malgraŭ tio, ke ekzistas palestin-araba ŝtato - Jordanio, kies tereno estas en kadroj de la iama Palestino kaj kies popolo konsistas el ĝuste la samaj "palestinanoj". Malgraŭ la fakto, ke tiuj "palestinaj araboj" ĝis la jaro 1967 kviete vivis sub la egido de reĝo Ĥusejn, neniam strebinte realigi tiujn "legitimajn rajtojn".

Kio okazis subite? - Post la masakro de 11.III.78,"Al-Fatah" - la centra organizo en kadro de PLO sentime proklamis, ke ĝi estas respondeca pro tiu ĉi ago. Tamen la politikistoj ne ĉesis subteni PLO. Politikajn mitojn ne estas facile elradikigi, precipe, ke ili priservas certajn diplomatajn celojn.

Ni ne povas konduti laŭ la rekomendoj pri sindeteno de reagoj. Tiun ĉi metodon ni praktikis dum 2 miljaroj kaj ni memoras la rezultojn. Tiuj, kiuj predikas submeti la duan vangon, bonvolu fari tiun eksperimenton je sia propra vizaĝo.

Kiam la israeliaj armefortoj enmarŝis en la sudan Libanon por purigi ĝin de la teroristaj nestoj kaj por savi la TIEAJN KRISTANOJN de kompleta ekstermo, la mondo maltrankviliĝis kaj multaj ŝtatoj,Britio, Francio, Belgio, Nederlando,Svedio kaj eĉ Turkio esprimis siajn malaprobojn. Ĉiuj ekprotestis. Eĉ Turkio, kiu mem invadis Cipron,akuzis nin pri invado de fremda teritorio.Por ili ĉiuj estas nia ago kontraŭ kutima konduto: Judoj devas lasi sin masakri silente, sen kontraŭstaro...

La prezidento Saadat bridis siajn "palestinanojn" en Egiptio. La reĝo de Jordanio elbuĉis ilin kaj multaj saviĝis forkurante al Israelo. La libana ŝtato krevis pro ili kaj restis povmanka sin kuraci de tiu kancero. Ĉiuj rajtis sin defendi kontraŭ tiu ĉi nesto de l' tutmonda terorismo. Ĉu ni, - la ĉefa viktimo - ne ???

J. Kohen Cedek

## ISRAEL ISRAELI NE PLU ESTAS INTER NI!

Post longtempa suferado forlasis nin por eterne la multjara fidela esperantisto Israel Israeli. Li mortis la 18-an de februaro 1978. Li estis agema ĉe la norda esperanta grupo, unu de la gvidantoj, ĉiam respondeca. Li apartenis ankaŭ al la Centra Komitato de ELI.

Sufiĉis por mi vizito kune kun la Konstanta Kongresa Sekretario s-ro Pompilio en la jaro 1967, kiam devis okazi la UK en Tel Avivo. S-ano Israeli akceptis kaj gastigis nin en Ĥajfo en sia loĝloko, rondvojaĝis por montri famajn lokojn, vidindaj dum la kongresa ekskurso. Li ne ŝparis monon kaj tempon. Renkontiĝoj kaj kunsidoj de la norda grupo ofte okazis ĉe li; lia edzino Raĥel ebligis kaj helpis al li sciante, ke la esperanta movado estas parto de lia vivo.

Li ankaŭ apartenis al la Kongresa Komitato. Kvankam li loĝis en Ĥajfo tamen li ne forestis de kunsidoj kaj plenumis taskojn laŭ decidoj. Li estis ankaŭ U.E.A.-peranto kaj ĉiam plenumis precize siajn taskojn.

Pli konata li fariĝis precipe post lia translokiĝo Tel Avivon. Aktive partoprenis la organizon de diversaj entreprenoj, precipe artaj. Li posedis belan kaj fortan voĉon (bason) kaj ofte gvidis komunan kantadon en nia klubejo.

Sed fatala sorto diktis alie. Suferante pro maligna malsano li ankoraŭ kuraĝis veni en la klubon por esti inter siaj e-istaj amikoj. Sciante, ke morto estas neevitebla li tamen interesiĝis pri la esperanta agado.

La esperanta movado en la lando perdis unu de la agemaj, fidelaj, sindonemaj kunlaborantoj. La mankon ni sentos ĉiam kaj ĉie.

Bona memoro Pri Li restos ĉe ĉiuj, kiuj venis kun Li en kontakto.

Honoro al Lia memoro
Naĥum Drezner

## KONDOLENCOJ

Esperanto-Ligo en Israelo esprimas siajn sincerajn kondolencojn al s-anino Raĥel Israeli kaj al s-ano Nisim Israeli pro la morto de ilia edzo kaj frato Israel Israeli.



## ĴAK ISAKOV

Kruela kaj malica mano forrabis de ni unu el niaj karaj kaj fervoraj samideanoj, Ĵak Isakov.

Malfacile estas nun por ni alkutimiĝi al la fakto, ke dum niaj solenaj kunvenoj ni ne plu aŭdos liajn artajn deklamojn, kiuj jam disfamiĝis eĉ eksterlande.

Lia voĉo sonis ankaŭ dum la solena malfermo de la lasta 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Rejkjaviko, Islando, kie li salutis en la nomo de Esperanto-Ligo en Israelo kaj rikoltis multajn aplaŭdojn.

Post la kongreso li publikigis siajn impresojn en la numero 62-a de Israela Esperantisto kaj tiu ĉi publikaĵo restas nun por ni kiel lia lasta memoraĵo.

Ĵak esperantistiĝis en 1974. Li estis membro de la Komitato de ELI kaj en la lastaj 2 jaroj diligente prizorgis la dissendadon de la revunumeroj de I.E. al ĉiuj abonantoj en eksterlando kaj enlande. Li estis ankaŭ fakdelegito de UEA.

Dolorige estas, ke je la sojlo de liaj preparoj partopreni la ĉijaran Universalan Kongreson en Bulgario, lia naskiĝlando, okazis la terura morto. Ni estas ĉiuj ŝokitaj de tiu ĉi tragedio.

Ĵak Isakov restos en nia memoro kiel fervora esperantisto, kiel kapabla kaj talenta homo.

Estu lia nomo gardata ĉe ni, inter ni kaj en nia Esperanto-movado.

## LA ELEKTOPOVO

Kurta la vivo, kiel ventblovo,
Tamen libera kun elektopovo.
Povas jà homo la bonon elekti,
Labori, konstrui, nenion difekti.
    Planti ĝardenojn, pomon, ĉerizon.
    Dezerton transformi al paradizo.
    Ami, indulgi kun afabla vizaĝo,
    Pace, trankvile korekti domaĝon.
Same li povas elekti alie.
Eviti laboron, kartludi pasie.
Rabi kaj ŝteli, militojn provoki,
ĉiujn noblajn ideojn primoki.
    Domojn detrui, homojn mortigi
    Por si, por aliaj inferon starigi.
    De vi nur ho homo, ĉio dependas,
    malbenon aŭ benon, kion vi mendas.

J. Giladi

## TRARIGARDO DE LA HISTORIO DE ISRAELLANDO

### LA II-A TEMPLO

En la mezo de la 6-a jarcento a.K. estis permesate al la Judoj reveni al ilia patrolando el la ekzilejo Babilono. Tio fariĝis ebla post la venko de la persa imperio, kies reĝo Ciro bonvolis permesi al la revenantaj hejmen judoj restaŭri ilian ruinigitan Templon en Jerusalemo (la 2-a Templo ).

Dum ĉ.4 jarcentoj ili vivis aŭtonomie en la Lando sub la persa regado kaj(post 332 a.K.) sub helnista reĝimo.

En 168 a.K. la helenista reganto de Sirio, Antioĥo Epifanes IV, provis limigi la judan aŭtonomion kaj anstataŭi la monoteisman kredon per idolkulturo. La judoj, gvidataj de la familio Ĥaŝmonaj, ekribelis kaj akriis plenan sendependecon post heroa militado kontraŭ la plimultnombra bone ekipita militistaro de Sirio.

Judujo estis regata de la Ĥaŝmonaidaj reĝoj kaj poste de Herodo. En 63-a jaro a.K. la reĝlando enigis la orbiton de la Romia imperio.

Sub la regado de Herodo grandaj konstrulaboroj estis plenumataj, el kiuj la plej impresa estis la rekonstruo de la Templo. La Okcidenta Muro kaj lasttempe eltrovitaj arkeologiaĵoj en Jerusalemo atestas pri la amplekso de tiuj ĉi konstruaĵoj. Jerusalemo fariĝis grava metropolo kun ĉ. 200.000 enloĝantoj.

Post la morto de Herodo la Romianoj streĉis sian pugnoforton direktitan kontraŭ la juda loĝantaro. En 66 p.K. komenciĝis la juda ribelo kontraŭ la fremda reĝimo. El ĝi finrezultis la detruo de Jerusalemo kaj de la Dua Templo (70 p.K.). Masada (Mecada), lasta fortikaĵo de la juda rezisto, falis en la manojn de Romianoj tri jarojn poste.

La judan loĝantaron en tiu tempo oni pritaksas je 3 milionoj. Post la malvenko multaj ribelantoj estis ekziligitaj kaj grandaj judaj komunumoj fondiĝis en najbaraj landoj.

Dum la periodo de la dua Templo daŭre evoluis la juda religio kaj la socia kaj jura sistemoj. Plimulto de la Bibliolibroj estis tiam kanonigitaj kaj la interpretado de la Biblio (Ekzegezado) evoluis en tion, kio pli poste estis konata kiel la "Miŝna".


La juda kulturo alfrontadis la Helenismon. Tiu ĉi konfrontado inter la propra kaj fremda kulturoj kreis konflikton rilate al la konservo de la juda identeco. Tamen, la helenista kulturo postlasis sian influon kaj kelkaj el tiuj postsignoj povas esti hodiaŭ vidataj en arkeologiaj restaĵoj - ekzemple, ĉe la antikva havenurbo Cezareo.

La epoko de la Dua Templo havas sian lokon en la historio de nia popolo kaj lando ankaŭ kiel la lasta periodo de



plena aŭ parta juda aŭtonomio; ĉar post la jaro 70, dum preskaŭ 1900 jaroj, la Lando Israelo estis ĉiam regata de fremdaj registaroj kaj neniam de la loka loĝantaro.

J. Ŝemer



### K R E D O

Formetis mi doktrinon kiel oni
flankenigas objektojn.
Oni ilin forgesas en trajno, atendejo
sur banstrando aŭ supre en vidturo.

Ekzistas veroj, kiuj ne fuĝas,
imunaj kontraŭ dishaladzo kaj rusto.
Malfacile estas difini ilin nome
oni ĉiam kaj ĉie ilin renkontas.

Pluenire oni ilin tie trovas.
Halte oni vidas ilin ĉepiede.
Trankvile oni dormas en ilia kunesto.
Vekiĝante oni ilin tuj revidas.

La tutmonda verkaro instruas manieron
trovi ilin
aŭ montras eblojn, kiel ilin eviti.
La mondo plenas de aksiomoj,
ne atentitaj kernoj, fidele rezistas
laŭfakte.



Plena de portivaj fundamentoj
plena de masiva ŝtonaro,
plena de rozoj pretaj forvelki.
De ondaro ĉiam fluema,
de flugiloj vole ascendaj,
de kolonoj portantaj tempon kaj tegmenton
longe, daŭre.

Ne ekzistas doktrino de absoluta nepreco
tiom longe la vero kiel herbo surŝtone
kreskadas,
vokas el venteg' kaj akvo, nube sin manifestas.
Ekzistas vero ĉiam kaj ĉie prikantebla,
ĉiam priparola, samkiel pri ajna konato renkontita
post paso de longaj jaroj.
Kaj ĉio kiel iam restadis, nenio perdiĝis.

Harry Martinson (Svediô)
trad. E.Schuldenfrei (Svedio)

(H. Martinson estis nobelpremiito; mortis en febr. 1978)

Efraim Kiŝon

**Homo senĉese estas survoje serĉante ion ajn — feliĉon, amon, petrolon aŭ ion alian. Kelkaj serĉas Sanktan Gralon, aliaj ŝtonon de l' saĝuloj. La aŭtoro de tiu ĉi artikolo serĉas siajn okulvitrojn — ree kaj denove.**

# Okulvitroj — misteraj helpiloj

Ili neeviteble perdiĝas, post kiam mi prenis ilin de mia nazo. Kelkfoje eĉ antaŭe. Ili ŝajne iamaniere forvaporiĝas, lensoj, muntaĵoj kaj diversmaterialaj kradoj. Estas enigmo.

Plej ofte tio okazas, kiam mi rapide volas noti ion.

Ĉar mi estas miopa — tiel mi jam naskiĝis —, mi ŝovas miajn okulvitrojn supren sur mian impone altan frunton. Kaj jen, ili estas for. La okulvitroj, ne la frunto. Sed kiam ajn mi vespere antaŭ ol enlitiĝi metas ilin sur la apudlitan ŝranketon aŭ sur ilian sekuran deponejon, nome sur la randon de l' bankuvo antaŭ ol enakviĝi, ili poste estas for. Ie en la domo ili sin kaŝas. Eble eĉ ekster la domo. Mi ne scias. Ĉar se mi scius, kie ili umas, mi ne devus serĉi ilin. Mi timas, ke ili ial malamas min.

La esenca problemo, la fakte nefinebla konflikto konsistas el tio, ke homo, kiu perdas siajn okulvitrojn, ja povus retrovi ilin nur helpe de okulvitroj. Sen okulvitroj oni estas duonblinda kaj senhelpe palpas tra la mondo simile al miopa serpento, kiu mordas en sian voston manĝante ĝin kaj fine eĉ sin mem.

Optikistoj, kiujn mi konsultis, konfirmis min en tio, ke okulvitroj apartenas al plej facile perdiĝantaj objektoj. Ĉefe hebreaj okulvitroj inklinas pruvi sian sendependecon, inter ili antaŭ ĉio tiuj kun delikataj muntaĵoj, ĉar mankas al ili necesa firmeco. Kaj estus senutile fiksi ilin al ĉeneto, por svingi ilin antaŭ la brusto kvazaŭ medalionon. Ili ja konas sian Karl Marx: Okulvitroj ĉiulandaj unuiĝu! Vi havas neniom per perdi escepte de viaj ĉenoj! Kaj jen! For ili estas.

Ĉe mi ĉio estas pro tio komplika, ke mi havas nur fatale malmultajn dioptriojn je mia dispono. Tial mi kapablas ekkoni kaj vidi ion kaj tion eĉ sen okulvitroj neniel malbone. Povas okazi, ke mi veturas per mia aŭto tra strange vualita pejzaĝo, ĝis mi subite perceptas, ke mi estas survoje sen okulvitroj. Aŭ mi, ekzemple, serĉas ilin senespere en la internremburajaj fendoj de fotelo kaj fine retrovas ilin — sur mia propra nazo.

Ĉe homoj kun diklensaj okulvitroj io tia neniam povas okazi. Sole iu miaspeca estas daŭre survoje serĉi siajn okulvitrojn inklinante eksplodi, kiam ajn tiu helpilo denove malaperis. Mi, miaparte, kutimas tiaokaze malbeni ilin hungarlingve (hungare) kaj tamburi per miaj pugnoj kontraŭ muro, antaŭ ol mi reprudentiĝas kaj rekonstruas la antaŭhistorion:

„Kie mi vidis ilin lastfoje?“ mi intense palpebrumante ekdemandas min. „Se mi ne eraras, kaj pri tio oni neniam estas certa sen okulvitroj, mi ankoraŭ uzis ilin legante la matenan gazeton. Poste mi malfermis ladskatolon de ternuksoj. Sekvis mia razado. Stop!“

La vizaĝ-flego liveras tre valoran indikon. Mi rapidas en la banĉambron, serĉas, esploras, turnas ĉion de supre malsupren, de dekstre maldekstren, sed trovas nenion. Eĉ matena gazeto kaj ternuksoj ne plu helpas min. Certan tempon mi devas majstri la nebulon.

Subite, mallonge antaŭ tagmezo, la okulvitroj subite reaperas sur la piano, sur tiuj klavoj por la plej altaj tonoj. Mi ne scias, kiel ili venis tien. Ĉar lastfoje mi ludis pianon kiel sepjara knabo.

„Ĉu vi eble per tio volas aserti“, neafabla leganto tie ĉi interrompos min, „ke viaj okulvitroj sin kaŝante intence mistifikos vin?“

Jes, ĝuste tion mi volis diri. Miaj okulvitroj vivas propra-aŭtoritate, eĉ tre vigle kaj amuze. Kiam mi nur por momento, por momentero metas ilin flanken, ili senbrue malaperas kaj perdiĝas. Ili ja scias, ke tio ĉagrenas min. Pro tio ili agas tiel. Kiam mi retrovas ilin, kie ili tute ne troviĝu, ekzemple ĉe la fenestro-fermilo aŭ en la fridujo sub viando-tranĉaĵoj, ili rikanas al mi neniel kaŝante sian ĝojon pri tio, ke ili denove sukcesis mistifiki min. Foje mi retrovis ilin eĉ en nia televida aparato, kie ili konfuzis dratojn. Kaj dum pasinta varmegoperiodo ili eĉ venis sur tegmenton. Ĉar ili povas flugi.

Kelkfoje mi preventarestas ilin. Antaŭ ol mi nokte enlitiĝas, mi fiksas ilin inter la krajon-tenilo kaj la kadrita famili-fotaĵo sur mia skribtablo kaj ankoraŭ en la lito lernas parkere: „Inter la krajon-tenilo kaj la familio, inter la krajon-tenilo kaj...“

Matene mi iras — ankoraŭ en piĵamo — al la skribtablo. Krajonon kaj familion mi trovas, sed ne okulvitrojn. Post kelkaj horoj mi devas veturi per mia aŭto en la urban centron. Kiam mi eksidas malantaŭ la stirilo veturante en la urb-centron, mi subite aŭdas de malantaŭe mallaŭte hola. Jen, miaj okulvitroj!

Kelkfoje ili malaperas kelkajn tagojn. Kaj mi vane ŝiras ĉiujn tapetojn de sur la muroj. La nura solvo tiakaze estas, tuj mendi novajn okulvitrojn. Ĝenerale miaj malnovaj reaperas kvin minutojn antaŭ la telefona informo de la optikisto, ke mi povas akcepti la menditajn novajn. Kaj tuj mi rezervas ilin por eventuala serĉado de la aliaj. Tiu bona sistemo taŭgas, ĝis paro da okulvitroj subite malaperas. Du paroj je mia dispono ne longtempe daŭras. Ili malamas unuj la aliajn. La plej bona edzino el ĉiuj asertas, ke ne okulvitroj, sed nur mi kulpas pri ĉi ĉio pro mia distriĝo. Ŝi tute ne konas okulvitran psikologion, Tial mi devas batali sola.

Subite mi ekhavis genian ideon, dresi nian miksrasan hundinon Filipino kiel okulvitro-ĉashundinon. Unue ŝi devis ekflari miajn okulvitrojn, kiujn mi frotis sub ŝia nazo. Poste mi kaŝis ilin ie en nia ĝardeno, akompanis ŝin al kaŝejo kaj donis al ŝi peceton da sukero kiel rekompencon.

Post kelfoja ripetado de tiu leciono mi hieraŭ ŝin testis:

„Pinjo!“ mi ŝin vokis. „Serĉu okulvitrojn!“ Filipino bone aŭskultinte la voĉon de sia mastro flaris en la aeron kaj tuj tiris min al la sukerujo. Mi povis kaŝi sukeron ĉie ajn. Pinjo ĝin ĉiufoje celtrafe trovis. Hundoj ja kapablas pro siaj bonaj nazoj vivi sen okulvitroj.

Post iom pli longa esplorado mi definitive solvis problemon: Mi ne plu forprenas miajn okulvitrojn de sur mia nazo. Dum korpa lavado aŭ simila flegado ili restas sur mia nazo, same, kiam mi ploras aŭ dormas. Mi eĉ sonĝas per ili, ke... mi perdas ilin.

Kaj matene, kiam mi vekiĝas, mi devas konstati, ke... ili estas for.

Tradukis Gerhard Ziegler



## AFORISMOJ

Ne troviĝas malesperaj situacioj - troviĝas nur malesperaj homoj.

---

Negativa atmosfero pliigas negaciadon, tiel kiel la marĉo pliigas moskitojn.

---

La ĝibulo vidas la mondon per sia ĝibo.

---

Petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro (L.L.Z.)
Petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu. (L.L.Z.)

---

La ombro estas sendisiga parto de la lumo, kiel la morto estas sendisiga parto de la vivo kaj homa ekzistado.

---

Kia estas la diferenco inter saĝulo kaj ruzulo? Ruzulo estas tiu, kiu sukcesas eliri de embaraso, en kiun saĝulo tute ne enirus.

Ĝis kiam vivas en la homo esperoj, li estas juna. Kaj tiu kiun nur la memoroj plenigas,jam estas maljuna.


---

Ne la pezo de jaroj premas la ŝultrojn de la homo kaj faras lin maljuna, sed la formo kaj maniero, kiel li ĝin portas.

---

Diris Napoleono:"Ne estas malbonaj soldatoj, estas nur malbonaj armeestroj".
Diris Aristo: " Mi tre amas la filozofon Platonon, sed pli mi amas la veron."

---



Ŝelomo Mandelkern (1846-1902)
D-ro, filologo, biblieSploristo
novelisto, poeto kaj tradukisto;
verkadis ankaŭ en lingvoj jida
kaj rusa.

## MIA KOLOMBINO

Sur kverk', en arbaro,
Kolomba am-paro
Svingadis per blankaj flugiloj;
Ni, - par' geamanta,
La nomojn sur planto
Elĉizis (kun kor'), per tranĉiloj.

Ĝis nun kverko floras,
Kolomboj deĵoras,-
Nenio ŝanĝiĝis dum jaroj;
Sur kverk', je memoro,
La nomoj, la koro,
Jen restis videblaj kaj klaraj.

Nur la amatino,
Laŭ sorta destino,
Delonge por ĉiam forestas...
Jen kial doloras
La koro,kaj ploras,
Kaj morna sopir' en ĝi nestas.

El la hebrea - J. Kohen-Cedek



## LA SUNA ENERGIO

La suna radiado estas neelĉerpebla fonto de energio, kiu almenaŭ teorie povas kovri ĉiujn homajn bezonojn dum la antaŭvidebla estonteco. Tamen ĝi havas kelkajn limigojn. La suno radias nur dum la tago kaj ĝia brilo estas uzebla nur,se la nuboj ne kovras la ĉielon.

Por kolekti la sunan energion ni bezonas vastajn suprajojn kaj pro tio ni ne povas ĝin uzi por solvi la transportproblemon. Ankaŭ la vaporo kaj la polvo en la aero malgrandigas grave la lumforton.


Oni povas kolekti la sunan energion per fotoelektraj piloj, kiuj senpere transformas la lumon en la elektran kurenton. Ĝi ŝajnas esti la plej ideala formo de uzo de la suna energio, sed la forto de la kurento de tiu fotoelektra pilo estas malgranda kaj pro tio oni uzas tiun ilon nur por liveri energion por la elektronikaj aparatoj en la artaj satelitoj.(Fotoelektraj piloj estas produktataj en Israelo).

Praktike uzataj estas sunaj varmkolektiloj. La suno varmigas la akvon aŭ alian fluidaĵon. Estas plataj kaj kaj konkavaj kolektiloj. La plata kolektilo estas tre efika, sed ĝi ne donas tre altan temperaturon de la fluidaĵo. Ĝi estas per tuboj transportata al la loĝejoj por ilin varmigi. Ni vidas ilin amase sur niaj tegmentoj. Per uzo de specialaj materialoj oni povis eluzi preskaŭ la tutan lumenergion,kiu atingas la kolektilon. Nur 5% de la energio perdiĝas en tiu procezo. (Tre alta efiko). En Israelo produktata kolektilo (Tadiran) estas unu el plej bonaj en la mondo pro sia efiko, pro siaj lastaj eltrovaĵoj. Por atingi en Israelo temperaturon de 90 centigradoj la kolektiloj devas esti klinigitaj suden je angulo 2-45 gr. (ĝi dependas de la latitudo de la urbo).

Se ni bezonas pli altajn temperaturojn ni uzas parabolajn aŭ sferajn konkavajn reflektorojn, kiuj koncentras la energion en unu lokon(en fokuso). Oni sukcesis per tiu metodo atingi 1000 centigradan temperaturon. La aparato por tiu procezo estas tre komplika,ĉar la konkava spegulo devas sekvi la sunradiadon, alie ĝi perdas sian efikon. Interese estas,ke studentoj de jerusalema universitato sukcesis konstrui eksperimentan miniaturan kolektilon,per kiu ili povis pretigi por si kafon aŭ teon.

Israelo dediĉas multe da forto kaj mono por pligrandigi la uzon de sunenergio,ĉar nia lando estas malriĉa en aliaj fontoj de energio kaj riĉa en sunenergio. Ĉiujare pligrandiĝas la procento de uzita sunenergio kompare kun aliaj formoj de energio por malgrandigi la bezonon de tre multekosta nafto.

R. Berlinerblaŭ



## ĜEMELIĜO de la GOTENBURGA ESP. ASOCIO (SVEDIO) kun TEL AVIVA GRUPO de E.L.I.

S-ano Edvard Schuldenfrei enmanigis al prez. de ELI, s-ano A. Manor, la sekvontan leteron:

Esperanto- Societo de Gotenburgo , 3.3.1978

Ril. ĝemeligon de Tel Aviv - Gotenburgo.

Al s-ro Aleksander Manor.
Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo,
Tel Aviv.

Estimata Prezidanto!

Apogante la belan sugeston de D-ro Henryk Maŝler pri ĝemeligo de la du metropoloj Gotenburgo - Tel Aviv, ni rajtigas s-ron Edvard Schuldenfrei, Göteborg, reprezenti nian societon ĉe traktado de la supra demando en via societo kaj ankaŭ ĉe koncerna oficiala instanco.

Kun amika saluto
Esperanto-Societo Gotenburgo.
Subskribis: prez. E. Johansson, sekr. I. Jerkell .

La Centra Komitato de ELI akceptis kun ĝojo la proponon kaj delegis d-ron Maŝler kontaktiĝi kun la tel-aviva urbestraro por priparoli ĝin.

D-ro Maŝler kontaktiĝis kun la personoj, kiuj respondecas pri ĝemeliĝo. Bedaŭrinde la tel-aviva urbestraro pro la specialaj cirkonstancoj preferis prokrasti tiun proponon al postea tempo, kiam la politikaj aferoj de nia urbo estos pli konvenaj por ĝi.


S-ro E. Schldenfrei, post ricevo de la respondo proponis, ke intertempe niaj du organizaĵoj fratiĝu kaj tiamaniere fari unuanpaŝon por postea ĝemeliĝo de la urboj. Intertempe li donacis de la Esp. Soc. de Gotenburgo cent kronojn (350 IL) al ELI. ELI esprimas sian dankon al sia frata societo kaj penos en estonteco rekompenci tiun donacon. Esperanto-Ligo en Israelo kun ĝojo akceptis unuvoĉe la proponon pri fratiĝo kaj agos en estonteco laŭ tiu decido.

E. L. I.



A. Holzhaus

## Krucvortenigmo n-ro 3.




Horizontale: 2. prefikso, 4. fadena envolvaĵo de pupo, 5. instruebla alegorio en formo de rakonto, 7. kantebla lirika poemo, 9. sovaĝa eŭropa bovo, 12. kelkaj presitaj kajeroj, kune binditaj, 13. malgranda venena serpento, 14. pronomo, 16. akvoŝvelo, 17. rivero en Afriko, 20. tropika manĝebla frukto, 21. plej malalta vira voĉo.

Vertikale 1. trinkaĵo, 2. vivmaniero de iu popolo, 3. rondforma elstara parto de iu organo, 5. kontrakto pri asekuro, 6. grimpanta vegetaĵo, uzata por aromigi la bieron, 7. nutraĵo, 8. meto en posedo de iu, 10. antikva skandinava skribsigno, 11. regula aranĝo de aferoj, 15. ĉambro de parlamento, 18. centra parto de rado, 19. aersimila materio.

Rimarko. Ĉe vortoj horizontale 4, 5, 12, 13, 16, 17, 20, 21, vertikale 2, 3, 5, 6, 8, 10, 11, 15, 18, 19 - la finaĵo estas forlasita.

(La solvo troviĝas sur la paĝo 19.)



## NIA MOVADO KAJ AGADO

### LA KLUBA AGADO

Pere de nia nova programestro ni pasigas daŭre agrablajn klubvesperojn. Dum la pasintaj monatoj la programoj estis interesaj. La klubanoj aŭskultis prelegojn en diversaj temoj.

Ĉar la membroj volonte aŭdigas siajn opiniojn rilate al la programo kaj klopodante, ke ĉiuj estos kontentaj, la programestro, s-ano R. Alberg, antaŭ nelonge aranĝis vesperon en kiu ĉiuj havis eblecon paroli. Vere multaj eluzis la okazon "malplenigi sian koron". La tiel nomatan "Kamaradan Interparoladon" gvidis tre vigle kaj interese s-ano Drezner. Mi ne volas preterlasi la okazon mencii, ke al multaj de ni mankas pli varma etoso kaj kamarada interrilato dum la klubvesperoj. Por helpi tion ni decidis pli ofte doni al ili distran enhavon.

Unu el niaj plej fervoraj esperantistinoj, s-anino D. Vunderbaŭm, aranĝis sukcesplenan vesperon kun muziko, komuna kantado kaj danco. Kvankam multaj el niaj membroj preferas interparoli anstataŭ danci, estis interese konstati, ke ĉiuj ŝatis la aranĝon.

La humoro estis gaja kaj la programestro intencas de tempo al tempo aranĝi "Distrajn Vesperojn" kun muziko, ludoj kaj simile por refreŝigi la kluban atmosferon.

E. Haroun

### KLUBAJ VESPEROJ

| | |
|---|---|
| Dekstrulo j kaj maldekstruloj | R. Alberg |
| La modo | D. Ŝor |
| Impresoj de la vizito en USONO | H. Maŝler |
| Lumbildoj de USONO | H. Maŝler |
| La "Dibuk" | J. Ben Alter |
| Komputiloj kaj Esperanto | M. Ben Porat |
| Dependeco en edukado | N. Blonstein |
| La energio-problemo | R. Berlinerblau |
| Interkomprenado | E. Haroun |
| Jerusalemo dum miljaroj | K. Perlman |
| Bankoj kaj valutoj | J. Ŝemer |
| Agado de TEJO | A. Wandel |
| Juda folkloro | J. Ben Alter |
| La ekesto de la nazia movado | A. Ron |
| Strangaj faktoj en kelkaj lingvoj | R. Alberg |
| Intertraktoj por la paco en la Mezoriento | A. Manor |
| La vojo al la fina venko de esp. | H. Maŝler |
| Diskuto pri la sama temo | |




---------



## NOVAJ GESAMIDEANOJ

Anŝel Rut
Batler Henia
Babo Ŝula
Gaber Eran
Livnat Eli
Livnat Ĥen
Midler Ĥaim
Midler Lea
Midler Mejdad
Manor Meir
Navon Eva
Klajner Irit
Uriel Dafna
Ranel Rami
Levanon Jeĥiel
Halber Arad
Pinĥasov Ilana
Karmi Ilan
Kohen Maksim
Goldŝmit Ronen
Zlotnik Lev
Aronjahu Rivka
Ben Ari Gina

Fibiĥ Tirca
Finkelŝtajn Neĥama
Fiŝel Hagit
Gelman Genia
Josifja Ŝlomit
Kaftori Roza
Kolkovski Jehuda
Lidor Rinat
Maĥtej Dvora
Moŝajov Lior
Pardo Aŝer
Peeri Lea
Polak Cvi
Polak Margaret
Polinger Ana
Rot Alon
Samli Raĥel
Zamir Jehuda
Zigelman Ŝlomo
Berkoviĉ Paŭla
Juval Pesaĥ
Sejnrok Joĥeved
Dajan Igael



## RADIA INTERVJUO

La 2-an de Februaro d-ro Maŝler estis intervjuata 15 minutojn en la radio pri esperanto kiel ŝatokupo dum la liberaj horoj. La intervjuo estis ripetita la 24-an de Februaro. Post la intervjuo venis al d-ro Maŝler 40 informpetoj pri la kursoj en la proksima estonteco.

## ARTIKOLO DE J. KOHEN CEDEK

En "THE AŬSTRALIAN ESPERANTIST" aperis interesa artikolo de s-ano J. Kohen Cedek pri lia renkontiĝo kun pioniro de nia lingvo prof. N. Slouŝĉ. La renkontiĝo okazis en Tel Avivo dum la angla okupaco. Dum la interesa interparolo ambaŭ ne sukcesis eltrovi, ke ili estas samideanoj.

Solvo de krucvortenigmo n-ro 3. (paĝo 17.)

Horizontale: 2. mal, 4, kokono, 5. parabolo, 7 odo, 9. uro, 12 volumo, 13 vipuro, 14. oni, 16. ondo, 17. Senegalo, 20. banano, 21. baso.

Vertikale: 1. kakao, 2. moro, 3. lobo, 5. poliso, 6. lupolo, 7. ovo, 8. dono, 10 runo, 11. ordo, 15 senato, 18. nabo, 19. gaso.

## DONACOJ

| | | |
|---|---|---|
| Levi Jaakov | | 100 IL |
| Henrik Karlsson | | 100 IL |
| E. Schuldenfrei | 10 dol. | 165 IL |
| Gotenburga Esperanto-Societo | 100 Sv. kr. | 353 IL |

S-ano Nisim Israeli donacis je la memoro de sia forpasinta frato Israel Israeli-estu Lia memoro benita ! 100 IL.

## ANONCOJ

Naturistoj /Nudistoj! Aliĝu al INOE (=Internacia Naturista Organizo Esperantista)!Informojn kaj aliĝilon bv. peti de H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, Germanio.

\- - - -

Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA) organizas Internacian Junularan E. Laborbrigadon. La laborarango okazos en aŭgusto 1978. En ĝi povas partopreni gejunuloj 16-30 jaraj. Por ĉiuj partoprenantoj estas certigitaj loĝloko, manĝoj, laborvestaĵoj kaj vojaĝkostoj en Jugoslavio. Eblas aliĝi nur ĝis la 1-a de majo. Detalojn kaj aliĝilon bv. peti ĉe JELI,p.k. 22041,Tel Aviv.

## JARKOTIZO

Ni afable petas ĉiujn membrojn de ELI plenumi ilian samideanan devon, pagante la jarkotizon por la jaro 1978 (per ĉi aldonita ĉeko).

La kotizo estas 50 IL.

Eksterlandaj legantoj bonvolu laŭpove sendi 10 int. kuponojn ( aŭ egalvaloron) kiel kovron de niaj elspezoj.

Koran antaŭdankon
La Estraro de ELI

## VOLAS KORESPONDI

Marijka Siderova, 5500 Loveĉ, Bulgario, Blok "Montaĵ-1" ver G, ap. 4. kemiistino 38 jara, edziĝinta,havas du filojn, ŝatas muzikon,ludas akordeonon, ŝatas legi librojn,volas interŝanĝi bildkartojn kaj gramofondiskojn.

o o o

Roger Andersson, Fjellstedska skolan, Östra Ågatan 6, S-153 Uppsala Sverige, Sveden. 18 jara studento-kun knabino 16-20 jara. Interesita pri Israelo,muziko kaj religio.

o o o

Antonio Molejon Rañon, Finisterre, 250. La Coruña, Hispanio. Volas interŝanĝi poŝtmarkojn.

o o o o